GISTO, DEC,2009.
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por VKafo-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00.

Proksimaj je la koroj..far Karesema.

Malofte oni povas diri, kę homoj estas proksimaj je la koroj. Des pli se temas pri distanco de miloj da kilometroj. Sed fakte - se oni kalkulas la dimension de amikęco kaj sentemo, tiam oni povas diri kę la distanco NE kalkuliĝas, ĉar inter koroj validas la sentokapablo...

Antaŭ tri tagoj mi spertis pri tio pruvon.

Miaj geamikoj el fora Ĉinio invitis min foje partopreni perskajpan renkontiĝon kun ĉinaj gelernantoj de Esperanto en urbo Nankino.

Ĝi ne estis mia unua sperto tiurilate ; feliĉe mi jam partoprenis antaŭe similan provkurson.

Ĉifoje mia duonfranca kaj duonĉina amiko, Michel Fontaine, raportis kę okaze de la Tutlanda Ĉina Kongreso okazos perskajpa konferenco kaj li kun lia edzino instruistino Neĝeta ŝatus mian pertoprenon. Kompreneble mi tuj konsentis.

Ju pli da varmeco en koro, des pli da vigleco en homa percepto... kaj tiel estu...

Ni interkonsentis kelkajn detalojn de la programo, kiu okazis kun mi aperanta sur la granda ekrano, dum la spektantoj povis rigardi kaj aŭskulti.

Paroli pri la emocio de mia partopreno ... estas por mi malfacila tasko. Mi ekvidis grupon da ĉinaj gelernantoj sur mia komputila ekrano helpe de mia kamerao. Ili ĉiuj aspektis feliĉaj kaj scivolemaj. Neĝeta, instruistino de la grupo, pofoje prezentis ilin al mi kaj ekis renkontiĝo per intersalutoj. Mi bone ekmemoris tiujn ĉarmajn geknabojn , entute 19 gelernantojn ok- kaj naŭ-jaraĝajn. Iliaj nomoj estis : Burĝona, Ĉielo, Fiŝo, Flora, Folia, Lago, Mara, Matena, Oceano, Ondo, Papilia, Ruĝa, Salika, San' , Stela, Suno, Terano, Tenera,, Jeanne.

En la klasĉambro krom gelernantoj kaj geinstruistoj (Neĝeta kaj Michel) ĉeestis : la organiza komitato de la Kongreso, fotistoj kaj fieraj gepatroj. Tuj post intersatuloj la perskajpa renkontiĝo glatis laŭ antaŭkonsentita plano.

- Mi montris kelkajn kolorajn objektojn kaj demandis : kia estas la papero ? Aŭ alia kolora objekto ? Kaj ankaŭ kelkaj gelernantoj faris al mi demandojn pri leciono. Kelkaj ordonis al mi : levu la dekstran manon, levu ambaŭ manojn, fermu okulojn, montru vian nazon kaj eĉ .. montru vian hundeton Pitokon...

- Nekredeble amuza momento venis kiam ĉiuj alproksimiĝis al la ekrano por rigardi mian Pitokon .. eĉ gepatroj kaj fotistoj alproksimiĝis. Poste...

-Venis la momento por kune kanti .. "Mi kaj vi ".

- Venis alia momento por kę mi kantu " Feliĉon".

- Fine venis bela momento kiam Ĉielo (dekjara knabo) ludis tipan ĉinan muzikan instrumenton .. kortuŝa momento.

- Je nia adiaŭo okazis kisoj, brakumoj, ĝis-revidoj .. kun la certeco kę ni estas amikoj proksimaj je la koroj kaj neniu ajn distanco apartigas nin unuj de aliaj - ĉar la distanco estas nur la geografia detalo.

- Mi nun avide atendas pluajn perskajpajn renkontiĝojn kun miaj gefrataj geamikoj...

FIŜKAPTADO

Neniu el niaj kompanojaplaŭdis aŭ sakris kontraŭ mia ĉapitro pri la flugskipano kiu kutimis“elsakigi batatojn” do mi denove surpaperigos epizodon el mia flugista vivo.

Ekflugo ĉe la flughaveno SantosDumont, RIO, je la sesa matene, per Konvair-tipa flugmaŝino. La tranokto okazos en Manaus’, post preterflugi Salvador’, Recife, Fortaleza, Belem’, kaj Santarem’ .La komandanto estis Abelardo, nordorientano kun la kromnomo Amarelo (flava), La nomo de la dua piloto estis Kalmon kies foto mi ankorau restas.ĉe mi. Li estis ne malbonkaraktera homo, nur iomete pedanta. Li snobe uzis gantojn dum la pilotado; plus mia sensignifeco, la radiotelegrafisto-navigisto kaj du diligentaj stevardinoj kies nomojn domaĝe mi ne plu sukcesas rememori. (Ne oldiĝu!) Posttagmeze, kiam oni estis postlasinta Belem’ alvenis demando el Manaus’: se la flugo ne suferos prokrastiĝon, ĉu vi, la skipanoj, volas entrepreni fiŝkaptadon en la Rivero Negro, planita de Paŭlinjo? Paŭlinho estis delonge amikego de ĉiuj skipanoj.Denaske li devis fari grandan klopodon por prononci vortojn kaj sin regi dum piedirado. Tre dankema reciproke al ĵurnaloj kaj revuoj kunportit,aj el Rio li ĉiam sindone favoris la aviadistojn ĵus alvenintajn. Nur ke,estis li doktoro en ŝerce kromnomi ĉiujn amikojn per fivortoj kaj fari maldecajn gestojn eĉ dum la skipo ankoraŭ ne forlasis siajn postenojn. La komandanto legis la mesaĝon, ĵetis signifoplenan rigardon al la ceteraj skipanoj. Polekso supren, estis la respondo escepte tiu de la fraŭlinoj. Ili divenis ke tro da fiinsektoj pikas riverborde.Ni do rapidigu la senembarasigajn laborojn en Santarem’’ Forta vento orienta favoris. Nia rapido montrigxis 410 km/h. Je tiu favora kondiĉo ni atingos nian celon ĉ. du horojn antaŭ la krepuskiĝo.

Surteriĝo ĉe Santarem’, post superpasi la aerodromon , fari la “bazan kruron,” interceptis la finan kontraŭventan finalon kaj glate surterigxis. Laŭ antaŭpeto la ekspedo okazis senprokraste.Bona vetero, ĉio marŝis kontentige por tuja ekflugo. Okazis tamen ke la dua piloto ekvidis la pneŭmatikon de la dekstra rado iom platiĝinta. La komandanto decidis ne riski daŭrigi la flugon. La radoŝanĝo devis plenumiĝi. Ni perdis ĉirkaŭ unu horo. La fiŝkaptado ne plu povis okazi samtage. Sekvan tagon ni devis flugi ĝis Kajena kaj reveni. Tiam restos tempo por nia fiŝrikolto se Paŭlinjo kaj lia skipo havos liberan tempon kaj uzis siajn kapojn. Surteriĝinte en Manaus’ nur ne ĉeestis muzikistaro sed la gaja akcepto al nia skipo okazis kiel kutime.ekvan tagon ni plenumis tion parton de nia vojaĝo al Kajena kaj revene, sen gravaj notindaĵoj. Denove Paŭlinho kun sia skipo el amikoj atendis nin pretaj eknavigi sur la Amazonasriverego. Ni rapide trapasis la hotelon, deprenis niajn uniformojn kaj, sen la stevardinoj, direktiĝis al la kajo kie staris barko kun provizaĵoj da biero kaj frandaĵoj por ĝuoplena veturo ĝis la fiskaptejo, transe de la granda rivero. Ĉirkaŭ duonhoro ni navigis flanke de kunpuŝiĝantaj dukoloraj akvoj de la riveroj (malhela kaj helflava). Ili resistas kontraŭ miksiĝo.Ne malroksime situis la fiŝkaptejo, preskaŭ ronda golfeto. Aliaj viroj de la skipo de Paŭlinjo atendis nin. Post la interkonatiĝo ni sciis ke fiŝoj estis pelitaj enen de la golfeto.Ni avidis eniri la akvon sed iom timis, chu piranjoj atendas nin? Baldaŭ oni sentis la ĉeeston de multaj fiŝoj. Post kelkaj minutoj mi kaptis fiŝegon ĉ. 8 Kg-pezan Tukunare’. Aliajn kaj multajn aliajn ni kaptis per la “ungoj” kaj okazis granda festa ĝojo. Neniam antaŭe unu el ni fiŝkaptis tioman kvanton da belaj kaj valoraj fiŝegoj. Kalmon fotis. Ĝis hodiaŭ mi konservas la memoraĵon

LA SALO DE LA TERO (D.Koimbra)

Mi scias kion Jesuo volis diri per la frazo – Vi estas la salo de la tero. – Mi ne parolas pri Jesuo de la religio. Religiajn aferojn oni ne diskutas. Salo de la tero estas ni, la homoj. Tio ne signifas ke ni estas gravaj, diradis la Jesuo-filozofo, la cetero estas aldonaĵo.La Ĵurnalismo, ekzemple, pretendas priatenti ĉiujn homajn aktivecojn nuntempajn. Ĝi dividas la vivon en sekciojn nomatajn editoraĵoj (Ekonomio,Politiko, Sporto, Polico, ktp) kaj povas rakonti tion kio okazas en niaj ĉiutagaj areoj. Kaj sukcesas. Moderna ĵurnalo estas kvazaŭ resumo preskaŭ ekzakta kaj preskaŭ preciza de moderna vivo. Envere, ĵurnalismo pritraktas nenion kio reale gravas. Laŭ pluraj manieroj eblas konstati kio vere gravas. Du ĉefaj estas, unue,.iĝi pasia, due, deprimiĝi. Homoj en deprimiĝo aŭ pasiaj komprenas ke la plej grava afero de la vivo estas ne la mono, balotado, dimanĉa futbalo. Tiaj komprenas ke la plej grava en la vivo estas la aliaj homoj. Sed , same pasio aŭ deprimiĝo estas malsaneca stato de la animo. Plejbonas bone kompreni kio vere gravas pere de observado direktita al pli saĝaj homoj, kiuj estas la patrinoj. Kazuza kantadis ke nur la patrinoj feliĉas. Ĝusto. Sed ne la patrinoj prifestataj, kiuj fieras ĉar ili scias dividi sian tempon kun gefiloj kaj sian profesian karieron, la patrinoj kaĵolataj en virina magazinaldonaĵo. Ĉi tiuj ne feliĉas. Mi parolas pri pratempaj patrinoj por kiuj la "kariero" estis ne grava. Kariero ne gravas. Mi referas al tiuj patrinoj uzantaj antaŭtukon,kiuj priridadis virojn kun siaj etaj zorgoj kiel, kiu fariĝos la venonta prezidento de la Respubliko. Tiuj patrinoj sciis, laŭ Kaetano Velozo, la plej ĝusta afero ne validas subsunan piediradon kaj ke nenio, nepre nenio enhavata de ĵurnalo valoras pli ol vespero plena de ridado inter bonaj geamikoj.

Tial, kiam la politikado estas el insultoj, kiel nuntempe okazas en nia Ŝtato, kiam la homoj estas agresataj en iu ajn medio pro io ajn motivo, la Homaro ŝrumpas. Ĉar la politiko kaj la opinioj gravas sed ne troe. Kio gravas estas la personoj. La personoj. La salo de la tero.

ĈU VI PLENUMIS?

Al multaj samideanoj mi plusendis mesaĝon kun ebleco aldoni sian nomon, en la manifesto kun instigo al ĉiuj gravuloj kunvenintaj en la monda konferenco pri la klimato, ke ili faru la maksimumon kontraŭ la varmigo de nia Planedo, legota en Kopenhago. Kiam mi aldonis mian nomon la nombro totalis 12.600.593 signaturoj. La celo estis atingi 15 milionojn. Kiu ne faris sian parteton, tiu apogoneganto, kiel ĉiam, malfrue pentos des pli ĉar la tutmonda kunsido kontraŭ la planeda varmiĝo fiaskis.

SENPAGA LOTERIO

Se vi aŭskultos recitadon de poezio kaj aŭdos la vorton ŜIARO, pri kio vi pensos? – kaj CICO? – DEKANTI? DEVANCI?, kaj KOLAZIONO kaj?, TABURETO? kion ili signifas? - Se vi ne scias la sinonimojn, mia kara, tio atestas ke vi legas malmulte kaj pigras anstataŭ konsulti vortaron, tial via kapablo flue paroli stagnas. La tri kiuj unua respondas ĝuste tiuj gajnas premieton. Bonŝancon al vi!

INVITO

Tre plaĉus al mi kaj certe al la ceteraj VK-rondanoj, legi malgrandan tekston, unue far la geZaghetoj, far Migel, kaj far Solon,... ne pli ol dek liniojn. Gisto antaŭdankas kaj atendas.

SKAJPO

Radioamatoro kiu migris al SKYP sentas sin forgesita en dezerto. Tion mi asertas ĉar ofte dumtage mi strigumas la renkontejon sed neniu vivulo troveblas.

SADIPSILONO

Verdnacilingve Sadi. En la e-reto mi retrovis tiun bonan amikon, kiu aktivis inter la gaŭĉaro dum la jaroj sesdekaj. Tiutempe li estis serĝento, loĝis en SanLeopoldo. Iam li deĵoris en Tokantins kaj nun emeritulo, loĝas en KampoGrande-MT
Liaadreso:esperantodorff@hotmail.com
Ni esperu ke la resupiro pri POA venigos lin ĉi tien iam en fino de monato por gustumi VKafon kaj, se varmego turmentos, trinki glason da freŝa biero kaj konatigi sin al niaj rondanoj kiuj lin ankoraŭ ne konas aŭ, kiel mi, ne plu memoris pri la flue parolanta amiko. Ĉiam bonvena ,Sadi.

HELPO

Krom Karesema neniu ensendis unu linion da kunlaboraĵo, domaĝo. Ĉu inter deko da geamikoj neniu havas ŝancon traflari revuo(j)n (Ĉu neniu iras dentiston, kuraciston, flughavenon?) Ĉu neniu el ni indas amuziĝi per anekdoto de vi ensendita kaj plusendita al Gisto?

FINJARAJ FESTOJ

Laŭ mi la nunaj komercistoj mortigas la seriozecon de sobra kristnasko-festo. Avidaj je senlima lukro, ili preminstigas gepatrojn kaj infanojn vivi la kristnaskan etoson ekde Novembro (aŭ pli frue) Gepatroj ne sukcesas kontraŭstari kaj la gefiloj jam ekuzas la ludilojn/vestaĵojn, ktp. En la 25ª Ĉio jam oldiĝis, la feliĉo kaj ĝojo ne plu regas la sanktan etoson, ĝuste kiam la Jesuknabeto alvenis.La adoltoj jam la antaŭvesperon, duon ebriaj, forgesas pri la ĉefa motivo de la elstara dato. Specialaj multekostaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj forgesigas la ĵus alveni(o)ntan Jesuknabon. Por tiaj homoj LI, naskiĝinta en stalo, nur egalvaloras al povra infano naskiĝinta en domaĉaro, portugale *favela*. Do, kial adori ĝin? Bona epoko estis kiam elstare bonedukitaj infanoj meritis premiojn

KOMENCANTOJ ZORGU!

Nacilingve kaj en Esperanto la verbo FINI estas pure transitiva = Mi finas la taskon=termino, acabo, finalizo a tarefa., sen sufikso IG.!
Ĉe la verbo DEVI la nea vorto prefere staru antaŭ la afero kiu devas NE okazi. Ekz.: Oni ne devas drinki...prefere oni devas **NE** drinki (sen zorgo pri ebrieco, trinki alkoholaĵojn)
Ĉe verboj kiuj modifas statojn, tiuj signalas la ŝanĝon kiu okazas. Ekz., METI sur la tabloN. - TRADUKI en EsperantoN (aŭ alilingven) . (Kiel en aliaj lingvoj).

Jen elkaj legindaĵoj. Bv rideti!

KRAŜO

Timulo, tuj post sidiĝi sur sian enaviadilan lokon, tuŝetas la stevardinon kaj demandas:junulino, ĉu el ĉi-tipaj aviadiloj ofte okazas kraŝoj?
-Nepre ne, diris ŝi plenfida.
La ulo vespiris kun la koro malpezigita. Tuj poste ŝi aldonis: Ĉi-tipa avio kraŝas nur unu fojon.

ENROMPANTOJ

Mia edzino ne lasas min dormi. Je iu ajn brueto ŝi pensas pri ŝtelisto kaj vekas min. – Diru al ŝi, ke domaj enrompantoj ne bruas! – Mi jam diris tion al ŝi kaj, ho ve, nun ŝi tute ne plu lasas min dormi!

SUBTENDA TRANOKTO

Ekskursantoj tranoktas sur kamparo, sub malgranda tendo.Noktomeze:-Ĉefo, rigardu supren, kion vi vidas? – La kompano forviŝas la dormemon el siaj okuloj kaj respondas: Mi vidas stelaron. -Kion vi opinias? – Laŭ Teologia vidpunkto, ke Dio kreis la senliman Universon; laŭ Astronomio, ke ekzistas milaroj da planedoj kaj laŭ Meteologia vidpunkto, ke morgaŭ ni havos belegan tagon – Kaj vi, la fama moŝto Ŝerlok Holmes, kion vi deduktas? – Tio havas bazan respondon, mia kara Vatson: -oni ŝtelis nian tendon.

Okaze de Kristkaskofesto 2009, GISTO deziras al ĉiuj amikoj ĝojon, feliĉan 2010 kaj ke ĝi fariĝu mejloŝtono por serioza ekologia sinteno far ĉiu homo!